

KONTAKTO

numero 141 (1994:3)

**Kameloj,
budhoj kaj
laktoteo:**

**Sur la
nekonata**

**ORA
VOJO**



- Gestuno: Esperanto de la silenta mondo
- La granda sekreto de Rusio
- Tatuado en Niĝerio
- Gajni en la *Bellertaj Konkursoj* nun estas facile!

Gestuno: Ĉu surdula Esperanto?	Vilhelmo Rowe, Britio	2
Kameloj, budhoj kaj laktoteo:		
Sur la Ora Vojo	Sabira Ståhlberg, Germanio	4
Satanaj proverboj (3-a, lasta parto)	Bernard Golden, Hungario	7
La angulo de Ludmila kaj Petro	Ludmila kaj Piotr Maliccj, Pollando	8
Tro	A. Minkin, Rusio / trad. V. M. Zejnalov, Svisio	8
Ne moviĝu!	Claude Piron, Svisio	10
Kial joruboj tatuas sian vizaĝon?	Ọşhọ-Davies Olúwábùnmí, Niĝerio	12
Kial hungaroj ne tostar per biero?	Kaszás Attila, Hungario	13
Laodoro de la papajo verda	Thomas Pusch, Germanio	15
La promeso	trad. Cláudio Rodrigues Pistilli, Brazilo	14
Tentaklo		14
Bellertaj Konkursoj (ludkonkurso)	Anna Löwenstein, Italio	16

KONTAKTO

Dumonata socikultura gazeto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO), eldonata de Universala Esperanto-Asocio (UEA)

Fondita en 1963

N-ro 141 (1994:3), 31a jarkolekto

ISSN 0023-3692

Legata en 90 landoj (voĉlegata por blinduloj)

Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando;
☎ +31 10 436 10 44;
☉ fakso +31 10 436 17 51
e-poŝto: uea@wammes.erc.eur.nl

Redaktoro: Francisco L. Veuthey

Konstantaj kunlaborantoj:

Felip Artero i Lozano (Katalunio)
Martin Burkert (Germanio)
Zoran Ćirić (Serbio)
Alberto García Fumero (Kubo)
Bernard Golden (Hungario)
Georgo Kamaĉo (Hispanio)
Ludmila kaj Piotr Maliccj (Pollando)
Remigiusz Mielcarek (Kanado)
Atilio Orellana Rojas (Argentino)
Ọşhọ-Davies Olúwábùnmí (Niĝerio)
Claude Piron (Svislando)
Anna Raĉoń (Pollando)
Cláudio Rodrigues Pistilli (Brazilo)
Jozef Truong (Usono)
Ilkka Santtila (Finnlando)
Sabira Ståhlberg (Germanio)

Grafika elpretigo: Roy McCoy


Provlegado: Rob Moerbeek

Presado: Grafisch Bedrijf Tuijtel

Facilingvaj artikoloj estas verkitaĵoj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de KONTAKTO. Tiu listo aperas en la unua numero ĉiujare.

Anonctarifoj:

Tutpaĝa 675 gld., duonpaĝa 375 gld., kvaronpaĝa 205 gld., sesonpaĝa 155 gld., okonpaĝa 110 gld. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Senŝanĝe ripetita anonco (ne anonco!) en sinekvaj numeroj rajtas je rabato de 20%. Por movadaj instancoj: 50% rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30% el la prezo de la koncerna anonco. La abontarifoj varias laŭlande. Petu informojn de la supra adreso.



enkonduko

Kiam venas la horo decidi pri ĉefartikolo mi troviĝas antaŭ krizeto, ĉar vere ne estas multo por elekti. Ĉu vi ne ŝatus ĉefroluli en unu numero de KONTAKTO? Ĝi devus pleniĝi, kun ilustraĵoj, minimume du paĝojn. Pri la temo vi mem decidus: ĉio eblas, escepte de la Movado. Komprenoble, ankaŭ materialo por la aliaj rubrikoj estas bonvena, sed prefere originala, ne tradukita.

De kelka tempo mi aŭdas, ke niaj krucvortoj estas tro malfacilaj. Ĉu eble vi kapablus verki facilajn? Kaj, se ili estas simetriaj, des pli bone.

Mi ĝojegas pro la apero de nova (afrika!) konstanta kunlaboranto, kiu surprizos vin sur paĝo 10. Kaj, kvankam pasintjare jam aperis rakonteto lia en KONTAKTO: elkoran (re)bonvenon al li!

Speciale, nia rubriko pri la IJK-temo, ricevis apartan emfazon en tiu ĉi numero. Bedaŭrinde venis nenio el Koreio mem, sed nia ĉef-artikolo, kiu laŭ sia karaktero povus esti enkadrigita en tiu rubriko, portas nin al Azio. Mi esperas, ke baldaŭ komencos veni kontribuajtoj el Rusio, kiu gastigos la IJK de 1995.

Bonegajn kongresojn en la lando de kvietata mateno!

Francis


Gestuno: Ĉu surdula Esperanto?

Vilhelmo Rowe, Britio

Gestoj apartenas al la plej internaciaj sistemoj de komunikado. Dank' al prilaborita gestaro, homoj, kiuj ne povas aŭdi aŭ paroli, efike interkompreniĝas. Sed... ĉu vere ili povas komuniki universale sen problemoj?

Meze de la 18-a jarcento la franca pastro* Charles Michel de l'Épée [elparolu ŝarl' miŝel' delepe'] elpensis sistemon por faciligi la komunikadon inter kaj kun tiuj personoj, kiuj pro surdeco* aŭ muteco* bezonas lingvon *videblan*. Lia lingvo konsistis el gest*-aro kun aldono de fingra alfabeto* por, ekzemple, propraj nomoj. En la daŭro de kelkaj jardekoj ĝia uzado transiris al aliaj landoj.

En la jaro 1834 ekestis en Francio ĉiujara bankedo* por surduloj, al kiu oni invitis neaŭdantajn homojn el la tuta mondo. La tiama ĉefgvidanto de la franca surdula komunumo, Ferdinand Berthier [ferdinan' bertie'] ĝojege anoncis eĉ, ke la gestolingvo estas tiu lingvo universala, kiu fakuloj dum jarcentoj serĉadis. Diris Berthier: "... tie (t.e. ĉe la bankedo) regas nesuperebla egaleco; tie la gestolingvo estas la sola permesita lingvo. Raportojn, protokolojn*, korespondaĵojn, memornotojn, ĉion oni legas en tiu ĉi lingvo, kiun surduloj el ĉiuj partoj de la mondo komprenas mirinde bone."



Jen kelkaj ekzemplaj bildoj el la bildvortaro de Gestuno. De supre maldekstre "arbo", "vegetal(ar)jo" (duparta gesto), "besto" (aŭ "animalo") kaj "azeno".





facila

Ĉu aŭ ne la deziro de Berthier estis prava, ŝajnas, ke la gestolingvo de la pastro tamen elturniĝis tro manko-hava, ĉar estas bedaŭrinda fakto, ke hodiaŭ ekzistas en la mondo multaj gestolingvoj, malsimilaj laŭ la landoj de uzado. Ekzemple britoj uzas la gestolingvon britan, ĉinoj la ĉinan, svedoj la svedan kaj usonanoj la usonan (eĉ ne dialekton* de la brita!).


Antaŭ proksimume tridek jaroj renkontis tiun problemon iuj "samideanoj" de ni, esperantistoj, el kio rezultis nova gestolingvo: Gestuno. La konstruprincipoj de Gestuno, kvankam iasence ne sufiĉe ĝisfundaj, rimarkinde similas al la principoj, kiuj gvidis Zamenhof en la kreado de Esperanto: maksimuma jama internacieco, profunda utiligo de vort-kunmetaj eblecoj kaj tiel plu.

En la jaro 1983 estis decidite elprovi Gestunon ĉe la naŭa Tutmonda Surdula Kongreso en Bulgario. Oni instruis ĝin al grupo da bulgaraj interpretistoj*, por ke ili "interpretu la kongreson", sed sendube la organizantoj komprenis nek la naturon de la problemo nek la grandecon de la necesa preparlaboro. Ĉiuokaze, la partoprenantoj ŝajne eĉ ne antaŭsciigis pri la neceso mem ellerni la lingvon (ĉu aŭ ne fakte ekzistis rimedoj por ĝin studi). La rezulto estis katastrofo*, kiu grave malutilis al la posta disvastiĝo de Gestuno.

Restas la demando, ĉu Gestuno mem estas sufiĉe bona. Post esploro mi eltrovis, ke ŝajne ne ekzistas lernolibro, sed mi sukcesis havigi al mi alian libron: temas pri la sola bildvortaro kun dulingva (angla kaj franca) teksto. En ĝi troviĝas proksimume 1500 fotoj de gestoj (kelkajn el kiuj vi povas vidi apude), sed nenia gvidado pri gramatiko, kiun laŭ la enkonduka teksto la verkintoj juĝis eĉ nedezirinda pro diverseco de la naciaj lingvoj de la uzantoj — la kontraŭo de la vero! Tamen la verkintoj, klare konsciaj* pri tio, ke la situacio estas nekontentiga, aldonis: "Ĉi tiu uzado de gestoj en izoliteco* prezentas kaj problemon kaj eblecon de devojiĝo al novaj alvenintoj."



De maldekstre la bildoj montras la diversajn gestojn por "arbo" en la gestolingvoj usona, dana kaj ĉina. Por tiu ĉi signifo Gestuno bazis sian geston sur la usona formo.



Ŝajnas al mi, ke ekzistas nekontraŭeblaj konvinkiloj favore* al ia plibonigo de Gestuno pere de Esperantaj elementoj, kaj pri tio mi mem nuntempe esploras. Intertempe la Esperantomovado povus ion instrui al la surdula gvidantaro, ĉu ne? □



Falsaj amikoj!
En la ĉina gestolingvo, la supra formo signifas "patro" kaj la malsupra estas "amiko", sed en lausona ili signifas (en la sama ordo) "sekreto/a"* kaj "kun".*

alfabeto: ĉiuj literoj de unu lingvo
animalo: komuna vorto por bestoj kaj homoj
bankedo: komuna manĝo por multaj partoprenantoj
dialekto: speciala formo, kiun ricevas unu lingvo en certa regiono
falsa: malvera
favori: agi konsente al iu prefere al aliaj
gesto: esprima movo
interpretisto: parola tradukisto

izoliteco: stato de tiu, kiu estas sola, sen kontakto kun aliaj
katastrofo: subita, tre malfeliĉiga okazaĵo
konscii: bone scii, kio okazas
muteco: malkapablo paroli
pastro: gvidanto de religia servo
protokolo: oficiala raporto pri tio, kion oni decidis
sekreto: io, kion devas koni neniu aŭ nur kelkaj homoj
surdeco: malkapablo aŭdi

AĈETU RABATE!

La Libroservo de UEA proponas al la legantoj de tiu ĉi revuo dekon da altkvalitaj verkoj kun rabato de almenaŭ triono de la kutima vendoprezco.

Al la rabatitaj prezcoj aldoniĝas la sendokostoj (10%, minimume 5 gld.) kaj ene de EU imposto de 6%.

La fenomeno Esperanto W. Auld. Pri lingvoproblemo. 120p.	48,00	12,00
La danĝera lingvo U. Lins. Persekutoj kontraŭ E-o. 546p.	66,00	44,00
Fundamenta krestomatio de Esperanto L.L. Zamenhof. 464p.	48,00	32,00
Nova Esperanta krestomatio Red. William Auld. 510p.	57,00	38,00
Lingvo kaj vivo Eseoj de G. Waringhien. 452p.	48,00	32,00
Ni kaj ĝi G. Waringhien. Pri religio kaj arto. 346p.	45,00	30,00
Vetero kaj klimato de la mondo Riley-Spolton. 132p.	28,50	19,00
La granda Meaulnes A. Fournier. Romano pri pura amo. 222p.	22,50	15,00
Homoj sur la tero Originala romano de S. Engholm. 235p.	30,00	18,00
Winnie-la-Pu Aventuroj de la fama urseto. 175p.	27,00	18,00

Rapidu mendi, ĉar la rabatitaj prezcoj validos nur ĝis la fino de aŭgusto 1994!

Komence de oktobro, dum ankoraŭ regis somero, mi alvenis al Lanzhou* (Langōu). Lanzhou estas la ĉefurbo de provinco plej meza (sur la mapo) en hodiaŭa Ĉinio, Gansu. Gansu estas provinco longega kaj mallarĝa, kaj efektive la nomo "Koridoro" tre taŭgas por ĝi. En historiaj tempoj pilgrimoj kaj komercistoj vagis tra ĝi survoje al Mez-Azio kaj Hindio. Tiam Gansu provizis al ili la lastan civilizeron (el ĉina vidpunkto), post kiu jam komenciĝis la dezerto kaj barbaraj landoj. Hodiaŭ Gansu estas industria sed samtempe tre malriĉa regiono — pro la naturo ja malmulto povas kreski tie. Okcidente limas la montaro Qilian (Ĉjiljan), ĉirkaŭ mil kilometrojn longa, kaj la norda duono de la provinco estas plejparte dezerto.

Saluton, grandnazulo!

Laŭ sia ĉina nomo Lanzhou signifas orkidean lokon, sed la kelkmiliona urbo montriĝis esti ĉio alia ol bonodora je orkideoj. En Lanzhou ekzistas peza industrio, kiu poluas la aeron eĉ dumnokte. Neniam mi vidis tie bluan ĉielon, kaj post kelka tempo mi sentis, ke mi devas forveturi por povi denove spiri libere. Kaj mi ekveturis norden, por rigardi kaj sperti la Oran Koridoron, tiel nomatan ne pro oro sed pro la flava koloro. Dum ĉiuj du mil kilometroj (mil norden kaj mil reen) mi satiĝis je flavo: flava sablo, flavaj domoj, flavaj arboj, Flava Rivero... Sonas tamen iom tro romantike nomi la tutan flavaron *oro*.

Efektive, ne estis facile eĉ aĉeti bileton, ĉar al Lanzhou vojaĝas malmultaj eksterlandanoj kaj precipe tre malmultaj, kiuj parolas la ĉinan. Mi tamen sukcesis elveturi el la ĉefurbo, nur por sperti, ke en aliaj urboj oni entute *neniam* vidis eksterlandanon, kaj se foje jes, nur en grupo. Mi devis unue komprenigi, ke oni ne kriu "hello" al ĉiu eksterlandano (neniu, al kiu mi demandis, sciis kion ĝi signifas), nek ke oni fikse rigardadu aŭ kriu *laowai* (loŭaj). *Laowai* estas laŭ ĉinoj karesnomo por eksterlandano, sed por mi freneziga vorto, ĉar kien ajn mi iris, ĉiuj sentis la bezonon laŭte notigi al aliaj, ke aperis *grandnazulo*.

Juguroj kaj ujuguroj

Survoje nordokcidenten mi decidis halti mallonge en Zhangye (Ĝangje), historia urbo, kie mi volis renkontiĝi kun juguroj, la ĉefa temo

Kameloj, budhoj kaj laktoteo:

Sur la nekonata

ORA VOJO


Sabira Ståhlberg pasigis kelkajn monatojn en Ĉinio, kie ŝia ĉefa tasko estis kolekti materialon por doktora tezo. Ŝi vojaĝis dum kelkaj semajnoj laŭ parto de la Silka Vojo, nome la plej nekonata kaj preteratentata Gansu-Koridoro aŭ ... Ora Vojo.

de mia tezo. Juguroj estas prae sama popolo kiel la ujuguroj en Xinyang (Ŝinjang), sed ili loĝas en Gansu kaj ne estas islamanoj, sed budhanoj. Ekzistas entute nur ĉirkaŭ 10 000 juguroj nuntempe, kaj nur en Gansu.

Mi eksciis, ke en la templo de la Granda Budho estas jugura tendo por turistoj, kaj pensis, ke mi eble komencu tie la esploradon. Mi do kun grandaj esperoj ekiris al la templo, kiu laŭ la turisma broŝuro estis konstruita antaŭ mil jaroj dum la tempo de Xixia (Ŝjjsja), de la sovaĝaj tangutoj, kiuj tiam invadis Gansu kaj tie kreis tute specialan budhisman kulturon. Tamen antaŭ ol ĵetiĝi inter la jugurojn mi decidis fari viziteton al la giganta Budho mem, kiu gran-



Fortikaĵo el sunbakitaj brikoj



**Supre: Dunoj. Eĉ kamelo
rifuzis traŭri ilin dum ŝtormo.
Sube: "Trinku, trinku!"
Bona gasto devas obei.**

Tekstoj kaj fotoj de Sabira Ståhlberg, Germanio

dioze kuŝis en nirvano kaj majeste okulumis al mi envenanta. Mi reciprokis kaj promesis reveni por interbabilo poste, ĉar la juguroj ja atendis min, kaj ĉifoje ili pli gravis ol eĉ Budho mem.

Malantaŭ la templa halo videblis blanka, kvadrata tendo kaj alia pli eta, ronda. La granda estis jugura, tion mi jam komprenis, kaj la eta estis mongola. Mi konatiĝis kun la estro de la tendoj, kiu estis nek mongolo nek juguro, sed tute normala ĉino. Li rakontis, ke estas nur unu jugurino tie, kaj ke la aliaj estas ĉinoj, mongoloj kaj tibetanoj el Gansu. Tio ne ĝenos vin certe, li klarigis, ĉar ilia kulturo estas preskaŭ sama tie en la montaro. Kion tio signifis, mi tuj ekspertis: la tibetanoj enportis trinkaĵojn kaj manĝaĵojn por la gastoj, kiuj tiuvespere estis ne nur mi sed granda grupo de gravuloj lokaj. Tio estis la "sama kulturo"!

Antaŭ mi subite staris bovlo kun iu blanka-griza likvaĵo ene, kaj sur la surfaco naĝis grandaj insuloj da butero. Mi iom miksis per bastoneto la tuton kaj konstatis, ke estas faruno sur la fundo. Tio, oni diris al mi, estas nia fama laktoteo, ĉefa nutraĵo de la montaraj kaj stepaj popoloj. Pro bonvolo mi gustumis, sed atente. Gustis je salo, lakto kaj rostita faruno, kun iu stranga kromgusto, kiu devus veni de la teo mem. Ĝi estas transportita de suda Ĉinio en formo de brikoj. Mi tiam ne vere ekŝatis laktoteon, tute male. Sed poste mi lernis konvinkite de juguroj trinki, kaj eĉ en iu alia vizito dum du horoj malplenigis kvin bovlojn da laktoteo.

La grupo alvenis kaj mongolo, tibetanoj kaj la jugurino subite ekkantis bonvenigajn kantojn, kaj ofertis fortan brandon en bovlo arĝenta al ĉiu laŭvice. "Trifoje trinku, pro ĝentileco", iu flustris al mi, kaj kun granda

fortostreĉo mi provis, sed la gusto post la unua gluteto estis tro terura. Baldaŭ ankaŭ venis la kutima kuirita ŝafa viando, ankoraŭ kun la ostoj, kaj bakaĵoj, kion ni ekmanĝis per la fingroj, dum la drinkado daŭris, kaj ĉiu urĝis ĉiun drinki pli. La rezulto estis aro da ebriaj gravuloj, kiuj pli kaj pli gajis. Kaj kantis. Kaj laŭtis. Tostadis. Drinkis. Kaj tiel plu.

Fakte multe manĝi kaj multe drinki estas devo de gasto inter la popoloj en la Qilian-montaro, kaj same en granda parto de Mez-Azio kaj Ĉinio. Se oni malmulte manĝas, la gastigantoj ofendiĝas, ĉar eble la gasto opinias, ke la manĝaĵoj ne sufiĉe bongustas. Kaj drinki oni devas, alikaze oni ne estas fidinda, nek bona gasto. Mi provis elturniĝi per trompado, ĉar mi ja vegetarano kaj neniel sukcesis manĝi sufiĉe de la ŝafa viando por ke la gastigantoj kontentu. Mi ankaŭ foje konvinkis, ke en mia lando virinoj ne rajtas ebriiĝi, same kiel la ĉinaj virinoj... Inter la popoloj en la montaro kaj sur la stepo ja ĉiuj drinkas, kaj viando estas la sola "vera" manĝaĵo.


Miraklo sur Gobio

Survoje ankoraŭ pli norden mi haltis en la mezo de Gansu, en la dezerto Gobio, kie la nova industria Ĉinio konstruis urbon Jiayuguan (Ĝjajuguan). Antaŭe en tiu loko troviĝis nura fortikaĵo, kelkcentjara, kaj mia celo estis vidi tiun miraklon, konstruitan el sunbakitaj brikoj. Se unu tagon pluvus nenio restus, klarigis al mi loka samideano, kun kiu mi bicikle vizitis la fortikaĵon. En tiu tago aspektis pluveme, sed ne pluvus malgraŭ tre pezaj nuboj. "Tiel estas", li diris, "ĉi tie ne pluvas".

Estis impresa la fortikaĵo, celita al gardado de la ĉina limo kaj laŭdire parto de la Granda Muro. Nenion similan al la Granda Muro mi vidis, nur etan murpecon kiun oni ŝajne, laŭ lokaj informoj, konstruis antaŭ jardeko por montri al la turistoj. Kiel multon alian, cetere.

La dezerto en si mem estis aparta sperto. Ni trabiciklis kvin kilometrojn tie (kiu diris, ke oni ne povas bicikli sur dezerto?), kaj mi lernis, ke dezertoj estas ne nur amaso da sablo, sed ankaŭ akvo kaj vivo. Survoje mi ofte povis vidi el la busa fenestro ŝafojn kaj kamelojn vagantajn en ŝajne tute seka regiono, kaj argilajn domojn faritajn el sunbakitaj brikoj. →


*La latinigitan formon interkrampe sekvas la Esperanta tiel kiel ĝin uzas la Kartografia Eldonejo en Pekino. Kiam ambaŭ koincidas ĝi aperas en ununura formo.



Unu el la plej popularaj revuoj en la internacia Esperanto-Komunumo, distribuata de la Redakcio ekde 1994

- 12 numeroj jare
- 52 paĝoj ĉiunumere, kun koloraj kaj nigrablankaj bildoj
- Informoj pri la Esperanto-movado tra la mondo
- Esperanto-rubrikoj "Voĉo de Esperantistoj", "Por Komencantoj", "Inter Ni" k.a.
- Aktualaj raportoj pri la progreso kaj socia kaj popola vivo de nuna malferma Ĉinio
- Interesaj artikoloj pri la tradicia kulturo, historio, literaturo, arto, medicino, filozofio, k.a. de ekzotika Ĉinio

Abonprezoj varias laŭlande. Abonebla ĉe la landaj perantoj aŭ ĉe UEA. Prospekto havebla ĉe la Distribua Fako de El Popola Ĉinio: P.O. Kesto 77, CN-100037, Beijing, Ĉinio.



flugigas sablon tra la urbeto. La sama amiko konstatis, ke mi ne plu havos multe da tempo en la urbo, kaj sekve decidis prunti de iu amiko motorciklon, por ke ni povu vidi la dunojn en tre speciala tempo, nome dum la momenta sabloŝtormo. Antaŭ ol mi sukcesis esprimi miajn dubojn pri la saĝeco de tia projekto, li jam staris tie kun la motorciklo, kaj ni ekveturis.

Post dek kilometroj ni haltis ĉe la plej belaj dunoj, kaj tiam mi estis jam sufiĉe trablovita, kun sablo en ĉiu angulo de miaj ŝuoj kaj eĉ en la fotilo. Ni grimpis sur kamelon kaj daŭrigis la vojon, dum la kamelo laŭte protestis al sia posedanto, ke tro blovas por ke oni entute iru ien. Kaj fine ni ekgrimpis la dunojn mem, kaŭrante ĉe ĉiu tria paŝo por ne forbloviĝi. Duonvoje ni konvinkiĝis, ke efektive tro ventas, kaj tiam ni ekglitis suben... La sablo estis tre fajna, kaj mi perceptis ĝin kiel neĝon. Krome ĝi estis tre penetrema, tiel ke miaj okuloj estis plenaj je sabloroj dum tri tagoj poste, kaj la vestaĵoj ankoraŭ ĉe la kvara lavado postlasis sablodunetojn en la lavujo...

Stormo sur la dunoj

Mia plej malproksima vizito okazis al Dunhuang (Dunhuāng), fama pro siaj pentraĵoj en la kavaro de Mogao, iom ekster la hodiaŭa urbo. Tien mi iris kun ĉina amiko, kiu same kiel mi tre interesiĝis pri la jam pli ol 1500-jaraj pentraĵoj. Tiucele ni havigis al ni poŝlampojn, ĉar en la kavoj, kie cetere oni ne rajtas foti, ne estas lumo. Ni vidis eble dudekon el la milo da kavoj kiuj ekzistas, kaj inter ili kavon kun tridekmetra sidanta Budho, kiu ridetis serene manon svinganta. Tamen nin plej amuzis elefanto kaj leono, sur kiuj rajdas du gravaj bodisatvoj*: la elefanto, skulptita iam antaŭ jarmilo kaj duono, aspektis tute kiel ĉevalo kun longa nazo, kaj la leono kiel hundo kun hararo. Supozeble la skulptisto neniam vidis la bestojn en naturo kaj plej verŝajne nur aŭdis, kiel proksimume ili aspektas...

Ankaŭ en Dunhuang ni vizitis la sablodunojn ekster la urbo. En tiu posttagmezo subite ekventis forte, kiel eblas en oazoj. Dunhuang ja estas ĉirkaŭita de dunoj, kaj precipe aŭtune kaj vintre povas okazi, ke la vento subite



Kun familio de orientaj juguroj en Lanzhou. Sube: adiaŭ al Qilian-montaro

Post tri semajnoj da plej strangaj kaj nekredeblaj aventuroj, kaj du mil kilometroj en busoj etaj kaj plenŝtopitaj (mi ja okupas lokon de 1 1/2 ĉinoj, kaj tial sentis min speciale premata de la ĉirkaŭantaj homoj) mi revenis al Lanzhou tra la dezerto kaj montaro refoje. Jam estis aŭtuno plena, kun grandaj temperaturaj diferencoj dum la tago. Vespere la temperaturo falis sub minus 10° kaj tage estis kutime 15° super nulo. Kaj ĉio sekis kaj flavis eĉ pli ol antaŭe; la arboj prepariĝis por la dezerta vintro, la homoj por la frosto kaj neĝo. "En la montaro jam neĝas", oni diris al mi, kaj efektive, mi povis vidi la neĝajn kapojn de la Qilian-montaro. Tiujn pintojn, kiuj kutime bluis sur la fono, kreante foje bluan unuiĝon kun la ĉielo, kiu ankaŭ tiom profunde bluegis super la dezerto. Dum la tero flavegis sube. □

Ĉinio provizas Esperantujojn per imponaj libroj, ĉiuj kun koloraj fotoj. Mendu de UEA: **Albumo pri Ĉinio** (96p., grandformata, 1984) donas superrigardon al plej diversaj aspektoj de Ĉinio. **8,40 gld.** **Dek ses urboj de Ĉinio** (176p., 1984) donas ĝeneralajn skizojn pri i.a. Lanzhou. **7,80 gld.** **49 vidindaj lokoj en Ĉinio** (251+19p., 1984) priskribas lokojn kaj ilustras per legendoj kaj historioj. **9,00 gld.** **Moroj de ĉinaj nacimalplimulto** (157p., 1991) prezentas festojn kaj kutimojn de 20 popoloj. **4,50 gld.**

Jen la lasta
parto de
tiu ĉi
"diabla"
serio.
Espereble
vi lernis
kelkajn

SATVNAJ³

proverboj

BERNARD GOLDEN, HUNGARIO

el la proverboj por iom fanfaroni uzante
ilin. Sed... ne tro laŭte: "Li" povus aŭdi...

Mia unua artikolo pri proverboj publikigita en *KONTAKTO* (n-ro 104, 1987:4) temis pri Dio. En la sekva jaro mi pritraktis originalajn proverbojn en Esperanto (n-ro 111, 1988:5). En tiuj kaj aliaj similaj artikoloj mi ne simple listigis la saĝajn eldirojn sed provis sisteme klasifi ilin enkadre de specifaj temoj, inter kiuj estas *ovo*, *fiŝo*, *vino*, *koko* kaj *pano*. Poste mi kolektis folklorajn sentencojn pri la diablo spite la admonon, ke oni "ne rakontu pri l'diablo eĉ en fablo". Tamen, estas dirite ankaŭ, ke oni "donu al la diablo lian meritajon", do mi dediĉis min al analizo de proverboj pritraktantaj la naturon de la diablo kaj diversaspektajn rilatojn inter la homo kaj la diablo, Satano aŭ demonoj.

1. Dio, religio kaj la diablo

- Ĝi estas nek de la diablo nek de Dio. (Hungara)
- Nek pio por Dio, nek kapablo por diablo. (Z)
- Malmulton oni farus por Dio, se la diablo estus morta. (Angla)
- Komenci per Dio kaj fini per diablo. (Z)
- La diablo dancas en malplena poŝo. (Angla)
(Malriĉeco logas la diablon. En antikvaj tempoj sur la reverso de moneroj estis kruco, kiu forpelas la diablon.)

2. Intimaj rilatoj kun la diablo estas malfavoraj.

- Kiu servas la diablon, havos turmenton kiel pagon. (Hungara)
- Kiu loĝas kun la diablo, manĝas ĉe la infera tablo.
- Same bone estas manĝi la diablon kiel la brogaĵon, en kiu ĝi estis boligita. (Angla)
- Kiam la diablo estas porko, oni manĝos lardon. (Angla)
- La manĝo de la diablo estas duone brano. (Angla)
(Maljustaj akiraĵoj certe seniluziigos la gajninton.)

3. Ankaŭ bonŝanco estas atribuebla al la diablo.


- La diablo zorgas pri siaj proksimuloj. (Angla, hungara)
- La bovino de la diablo naskas du fojojn jare. (Angla)
(Oni diras tion pro envio pri tiuj, kiuj prosperas en la mondo, kvazaŭ ilia riĉeco venus de la diablo.)
- La infanoj de la diablo havas la bonŝancon de la diablo. (Angla).
(Feliĉa estas la infano, kies patro iras al la diablo, agente malmorale kaj malhoneste por akiri riĉecon favore al la infano.)

- Por esti riĉa oni bezonas parencon en la domo de l'diablo. (Itala)
- Tro rapida riĉiĝo diablon ĝojigas. (Z)
- La diablo ne posedas ŝafinaron sed vendas lanon. (Albana)
- La herbon forportu la diablo, se jam mortis la ĉevalo. (Hungara)
- Kiam la diablo estas morta, neniam mankas al li ĉef-funebranto. (Angla)
(Neniu malbono estas tro enorma, ke intereso kaj pasioj de kelkaj estu ligitaj al ĝia daŭrigo, do ili bedaŭros ĝian malaperon.)

4. Diversaj aliaj aspektoj de rilatoj inter la homo kaj la diablo

- Unu estas diablo, la alia malbona animo. (Hungara)
- Vidiĝas diablo sub masko de afablo.
- Pli bona diablo al vi konata ol tiu, kiu estas tute fremda. (Angla)
- Kiun la diablo pelas, tiu sentas neniun plumbon en siaj piedoj. (Angla)
- Ŝi kapablas ligi la diablon sur kuseno. (Flanda)
(Ĝi estas la ekvalento de la zamenhofa proverbo: "Malbona virino diablon superas".)
- Najbaran katon la diablo prenu; nur nia kato sian felon gardu. (Hungara)
- Pli bone lulilo sen infano ol ene malica satano. (Albana)
- Se vi alportos la diablon, mi venigos lian patrinon. (Angla)

(Fino de la serio)



Martin Bunkert

7

FARIĜU KONSCIA SUBTENANTO DE TEJO!

fariĝu
patrono de TEJO

Pagante 3-oblon de vialanda MJ(-T)-kotizo vi ne nur subtenas la esperantistan junularon, de TEJO vi ankaŭ ricevas:

- Kontakto;
- TEJO tutmonde (oficiala organo de TEJO);
- akcepton dum la ĉiujara Universala Kongreso;
- aliajn laŭkazajn servojn kaj publikaĵojn.

La angulo

de Ludmila kaj Petro

krom pri matematiko kaj fiziko,

Newton [e/p. njutn], okupiĝis pri alkemio.

Unu el liaj preferataj aŭtoroj sur tiu ĉi

kampo estis la polo Michał

Sędziwój [e/p. miĥaŭ senzivuĵj],

kiu vivis de 1566 ĝis 1646 kaj

estis konata ankaŭ kiel

Sendivogius Polonus. Kiel

alkemiisto li estis estimata

en la tuta Eŭropo kaj

laboris en la kortegoj


de Sigismondo la 3-a,

reĝo de Pollando kaj

Svedio, kaj de


imperiestro Rudolfo

la 2-a en Prago.



Detalo de
La alĥemiistoj,
penetraĵo de
Stradanus


klaran eĥon ni povas aŭdi nur kiam la sono revenas al ni post — minimume — la tempo bezonata por elparoli unu silabon. Tio estas cirkaŭ 0,2 sekundo, kio respondas al distanco de pli ol 34m. de la sonresonanta obstaklo. Kiam la distanco estas malpli longa eĉ por unu silabo, la resona ondo revenas ankoraŭ dum la elparolado. Tiam okazas la tiel nomata *efekto de revibrado*, kiun eblas rimarki kiam ni parolas en, ekzemple, malplena ĉambro. Kiam muroj bone resonas, la revibrado povas daŭri tre longe. En la baptejo de unu el la Pizaj preĝejoj la revibrado daŭras eĉ 20 sekundojn!



Vladimir Miĥajloviĉ Zejnalov estas rusa politika ekzilito, kiu ekde 1992 troviĝas sub protekto de la Alta Komisaro de UN pri Rifuĝintoj, unue en Beogrado, nun en Svisio. Vivinte kaj laborinte dum 6 jaroj en la sekreta urbo Krasnojarsk-26 kiel inĝenierokonstruisto li konfirmas, ke la enhavo de tiu ĉi artikolo veras. Li tradukis ĝin por KONTAKTO el la rusa revuo OĜONJOK. La aŭtoro estas Aleksandro Minkin.

Gorbaĉov kaj Jelcin renkontiĝis inter kvar okuloj la 21-an de decembro [1991]. Ili interparolis dum 6 horoj (8 laŭ aliaj fontoj). Tion ĉi scias ĉiuj. Sed *kion* ili preparolis, neniu scias. Ĉiuj tamen rimarkis, ke Jelcin eliris el la konfidenca konversacio tre ĉagrenita, konsternita.

La preparolitaj punktoj estas absoluta sekreto, konata nur de malmultegaj. Fakte, hodiaŭ nur 3 aŭ 4 homoj pri tio plene scias (unu el ili nun troviĝas en moskva malliberejo, kiel puĉisto). [Intertempe la provintoj de la puĉo kontraŭ Gorbaĉov en aŭgusto 1991 estis liberigitaj. —Red.] Plii trideko posedas partan informon pri la afero. Mi perfekte konscias, ke pro diskonigo de absolute sekretaj faktoj la oficialaj instancoj de la ŝtato taksos min ŝtata krimulo. Sed hodiaŭ la situacio de la lando estas tia, ke mia kompreno pri mia civitana devo ĉi-okaze plene diferencas de la krima kodo, de la leĝo pri amaskomunikiloj kaj de la konstitucio de *USSR, KŜŜ, RU?* Mi estas certa, ke estas





Sceno de 300 mil do sieba. filmo de la pola regisoro Maciej Dejzer

neniu ŝanco malimpliki la landon el la krizo sen plene informi pri la reala situacio enlande. Kiel reformoj povus sukcesi, se eĉ Gajdar [la tiama ĉefministro] ne komprenas la veran situacion?

La popolo al kutimiĝis al la neceso plurhore vicostari, al la konstanta manko de ĉio: nutraĵoj, vestaĵoj, loĝejoj ktp. La gazetoj kaj revuoj senĉese raportadas pri ia "konstanta ekonomia kresko", dum la mankoj streĉe pligraviĝas. Neniu supozas, ke apud la mensogoj de la oficiala gazetaro kaj de la centra statistika oficejo ekzistas granda fakta kaŭzo de tiu universala mankado, kaŭzo, kiun eblas simple nomi: LA TROAJ HOMOJ aŭ la eksterstatistikuloj. En eksa Sovetunio loĝis ne 280 milionoj, kiel asertis la oficialaj statistikoj, sed 400 milionoj.

Jen la sekreto, pri kiu la prezidanto de Rusio iĝis senespera. Ni memoru lian strangan paroladon en la tutarma oficira kunsido, lian neklarigeblan (kaj neklarigitan) rifuzon renkonti la japanan ministrin pri eksteraj aferoj, same kiel lian misteran malaperon dum du tagnoktoj... sekvatan de subita reapero sur krozoŝipo, klarigitan per absolute nekonvinkaj argumentoj: antaŭ ol renkonti prezidanton Bush li decidis premi la manojn al mararmeo de la Nigra Maro. Ĉu estis necese? Kial ne manpremi en Kremlo?

Estas klare, ke ne eblas kontentigi la postuladon de varoj, se oni produktas kaj aĉetas por difinita loĝantaro, dum la nombro da animoj superas per 123 milionoj la oficialan statistikon. Laŭ la sola dokumento, kiun mi sukcesis vidi kaj kiu montris la ĝustan ciferon, la nombro de troaj homoj estas 123.370.000.

La historio de tiuj eksterstatistikuloj (civitanoj ilin ne eblas nomi) komenciĝis en la tempo de Jeĵov, t.e. dum la grandegaj persekutoj, kvankam la unuaj koncentrejoj por "neregistritaj personoj" aperis preskaŭ tuj post la revolucio, jam en 1918. En la lastaj semajnoj la gazetaro plurfoje menciis pri Arzamaso-16, sekreta urbo de nukleistoj. Antaŭnelonge tien veturis eĉ usonanoj. Sed neniu demandis sin, kial la sekreta urbo havas tiel neordinaran nomon. Kiel tio klariĝas? Per la volo konservi sekreton. Temas rekte pri militindustrio kaj konstruo-ficejoj. Fakte ĉiu Arzamaso (ekzistas 27 da ili) estas urbo kun loĝantaro de pli ol 100.000 homoj. Krome ekzistas multaj Ĉeljabinsko-j (93) kaj ankaŭ Krasnojarsko-j. En Centra Azio kaj Kazahio troviĝas ampleksaj, nenie indikitaj loĝlokoj. Mapoj, poŝtaj informiloj aŭ enketoj statistikaj ignoras ilin. Iliaj loĝantoj ne havas voĉdonrajton. En la oficialan popolnombrodon ili ne eniras. Ĝenerale la vojoj al tiuj sekretaj urboj estas severe kaŝitaj. La loĝantoj vestas sin laŭ la klimato, sed unuforme. Iliaj nutraĵoj estas malabundaj (escepte por sciencistoj, estroj kaj ties familioj). Psikaj malsanoj tie superas per 25% la oftecon registritan en ordinaraĵoj.

La loĝantaro de tiuj urboj kreskas pli ol laŭ la landa meznombro, pro du kaŭzoj. La unua estas, ke enmigrado okazas nur unudirekte: eblas enveni, ne eblas elveturi. La dua, ke aborto ne estas akceptita. Kiu plej suferas inter tiu troa loĝantaro estas la naturdotitaj infanoj. Iliaj kapabloj ne povas inde disvolviĝi. Krii ĉi tie (aŭ aliloke) ne helpas. Ne eblas eĉ nomi tion krimo de la reĝimo. Temas simple pri monstra detalo de la monstra dudeka jarcento. Kiaj eksceso rezultos el la proklamado de ĉi tiu informo, estas malfacile diveni. Konsolas min la fakto, ke la civitanoj de tio, kion oni nun nomas Komunumo de Sendependaj Ŝtatoj, finfine ĉesos demandi al si, al la amikoj, al la gazetaro kaj registaro, kial loĝejoj, nutraĵoj, vestaĵoj ktp konstante mankas.

Por 280 milionoj ĉio nun havebla sufiĉus. Sed se oni disponigus tion nur al ili, la 123 milionoj da troaj loĝantoj sub libera ĉielo devus malsatmorti. (Ogonjok 1992) □

G

Kalocsay kaj Waringhien,
konsilpretaj je via dispono . . .

PLENA ANALIZA GRAMATIKO

Kun grafika rearanĝo kaj kompleta termindekso,
Plena Analiza Gramatiko estas nepraĵo por ĉiu serioza uzanto de la internacia lingvo.

Ekzistas tri ĉefaj rasoj* en Niĝerio: la joruba, la haŭsa kaj la iboa, ĉiu el kiuj havas proprajn tatuojn* (aŭ tatuajojn, se vi preferas), malsimilajn unu de la alia. Sed eĉ ene de unu raso troviĝas aliaj, malgrandaj subrasoj, ĉiu el ili kun propraj tatuoj. Kelkaj eĉ kredas, ke la haŭtodesegnaĵoj estas malsimilaj en ĉiu vilaĝo. Sed... kial oni tatuas sin?

Antaŭ multaj jaroj batalegoj estis oftaj en Niĝerio. Tiutempe, infanoj komencis subite malaperi, perdiĝi. Povuloj kaj riĉuloj aĉetis la idojn de senpovuloj kaj malriĉuloj. Edzinoj ankaŭ perdiĝis tiel ĉi, kaj eĉ fortaj viroj.

La "perdiĝintoj" estis venditaj en aliaj landoj kiel sklavoj*. Kaj tie, alilande, eble iuj samrasanoj renkontiĝis sen povi rekoni unu la alian. Tial oni decidis ek-tatui la infanojn por ke, se iu ŝtelos ilin, ili eble povos iam hejmenveni.

Kaj jen ekzemplo: antaŭnelonge kelkaj homoj, kiuj revenis de G a n a o , efektive povis trovi sian hejmon en Niĝerio dank' al siaj tatuoj, kvankam verŝajne ili ne estis sklavoj. Simile, inter vilaĝanoj oni desegnas striojn* sur la haŭton por

marki etajn infanojn kaj geparencojn, por ke unu povu rekoni sian familianon.

Ankaŭ por ke iu ne erare infanŝtelu samrasanon aŭ samvilaĝanon oni uzis tiun rimedon! Kiam sklavaĉetisto rimarkis, ke iu ŝtelis lian samrasanon aŭ samdomaronon, rekoninte lin dank' al la tatuoj li povis liberigi la sklavon aŭ perforte aŭ per pago. Ĉial do ekzistas diversegaj manieroj tatuoi.

Alia kialo por tatui sin estas plibeligo. Oni opinias, ke tiun ĉi kutimon komencis la nordanoj de Niĝerio, nome la haŭsoj, por plibeligi sin. Kaj viroj kaj virinoj praktikas ĝin.

Tamen, oni ne plu kutimas tatui sin kiel en antaŭaj tempoj. Grava kaŭzo estas la ĉesigo de batalado kaj sklaveco. Riĉuloj ne plu povas proponi fikomercon al la malriĉuloj. Krome, malsatego kaj manko de materialoj, kiuj ankaŭ kaŭzis sklavecon, jam malkreskis. Onidire, antaŭe

facila


Rigardante niĝeriajn vizaĝojn oni renkontas diversajn specojn de tatuoj.

Kial?


Kial joruboj tatuas sin?

Ọshọ-Davies Olúwábùnmi, Niĝerio

iuj blankuloj interŝanĝis sklavojn eĉ kontraŭ ornamaĵoj*. Oni rakontis al mi, ke iu nigrolo donis sklavojn kontraŭ speguloj.



Kiaj tatuoj? En Niĝerio ekzistas diversaj tatu*-specoj, ĉiu el kiuj havas apartan nomon: *àbàjá*¹, *gòmbò*, *kéké*, *pélé*, *tùré* ktp. Sed unu tatu-speco, *àbàjá*, ekzemple, ne estas sama ĉie. Ili malsimilas laŭ la popolo, regiono, foje la vilaĝo aŭ eĉ la familio! Jen ni montras kelkajn: 1 kaj 2 estas *àbàjá*, sed la unua




Kial hungaroj ne tostas per biero?

Kaszás Attila, Hungario

En la jaro 1848 multaj eŭropaj popoloj ribelis por sia libereco, ĉu kontraŭ sia propra reĝo, ĉu kontraŭ la subpremo de alia potenco. Parizon, Vienon, Pragon kaj Milanon skuis revoluciaj eventoj. Ankaŭ Hungarion, kaj ĝian plej grandan urbo-duopon Pest-Buda (ekde 1873 la unuiĝinta ĉefurbo: Budapeŝto) atingis la printempa vento de la revolucio. La loĝantojn de Hungario entuziasmigis apud la demokratiaj postuloj de libera gazetaro kaj elektita respondeca parlamento ankaŭ la ideo pri sendependiĝo disde Aŭstrio. La nova revolucia registaro sub la gvido de Kossuth Lajos (1804-1894) sukcesis rezisti kontraŭ la atakoj de la Aŭstra Imperio dum pli ol unu jaro kaj duono. La popolamasoj, la ĵus egalrajtigataj kamparanoj, la patriotaj urbanoj, studentoj kaj laboristoj defendis la novan liberecon.

Eŭropo tamen vivis sub la regado de la "Sankta Alianco", la reakciema kunlaboro de la eŭropaj imperioj post la venko kontraŭ Napoleono en 1815. Pro tio, kvankam Hungario sukcese batalis kontraŭ unu el inter tiuj imperioj, nome Aŭstrio, la "eŭropa ordo" ne permesis la hungaran aventuron pri sendependeco,

Hungaroj tostas per ĉiaj trin-kaĵoj kaj drinkaĵoj, sed nur per biero ne. Kial? La respondo troveblas en okazaĵoj antaŭ 145 jaroj. Ni tamen komencu unu jaron pli frue.



ĉar tio estintus tro alloga ekzemplo por la aliaj subpremataj popoloj. Do, Rusio helpis sian najbaran imperian kolegon, kaj invadis Hungarion per duoble pli granda armeo ol la tuta hungara soldataro. La plua rezisto estus superflua sangofluo,

pro tio la hungara armeo demetis siajn armilojn antaŭ la rusoj (ne la aŭstroj!). Dekmiloj da hungaraj soldatoj iĝis kaptitoj, inter ili ankaŭ la oficiroj.

La rusaj oficiroj promesis ne puni la hungarajn, tamen la aŭstroj neglektis tiun promeson. Frumatene je la 6-a de oktobro 1849, apud la fortikaĵo de la urbo Arad (hodiaŭ en Rumanio), 13 generaloj de la hungara armeo estis ekzekutitaj. Estas interese trarigardi la liston de la generaloj: Aulich Lajos, Damjanich József, Dembinszky János, Dessewffy Arisztid, Kiss Ernő, Knézhich Károly, Leiningen-Westerburg Károly, Nagy-Sándor József, Perczel Mór, Pöltenberg Ernő, Schweidel József, Török Ignác, Vécsey Károly. Vi povas trovi en tiu listo germanajn, serbajn kaj polajn nomojn, kio klare montras, kiom internacia estis la "afero de la hungaroj". En iliaj vicoj batalis tutaj legioj da pojoj kaj aŭstro-germano.

Revenante al la origina temo: post la ekzekuto de la hungaraj generaloj la aŭstraj oficiroj okazigis feston, kie ili ofte tostis per biero pro la venko super la "ribeluloj". Ekde tiu tago, la tago de la nacia funebro, neniu konscia hungaro tostas per biero. Tiun tradicion de generacio al generacio transdonas la patroj al siaj filoj; pro tio ankaŭ vi ne miru, se via hungara amiko iam rifuzos tosti kun vi per biero, sed rememoru tiun mallongan historion. □

Kompreneble, kelkaj ankoraŭ tatuas sin. Ekzemple reĝa kandidato* por la grupo Alááfin' en la urbo Ifè devegas fari striojn sur si. Temas pri unu el la postuloj por tia kandidato. Oni tatuas ankaŭ la vizaĝon de *abíkú*, infaneto, kiu laŭ la popola kredo, estas membro de malbonularo. Li mortas juna sed baldaŭ revenas al la samaj gepatroj por nova naskiĝo. Sorĉ*-kuracisto tatuas ĝin kaj

metas sorĉaĵon en la striojn malebligante tiel, ke la infaneto mortu refoje.


Fremdaj religioj ankaŭ ludas en la malkresko de tiu arto. Nuntempe oni ne plu tatuas la vizaĝon de infanetoj, ekzemple. Inter kristanoj* kaj islamanoj* apenaŭ troviĝas iu, kiu markas sin vizaĝe. La kutimo forpasadas.

Dum la komenco de tatuado por facila rekono oni tatus nur sian vizaĝon sed poste, kiam la homoj ekfaris tion por plibeligi sin, oni ne plu konsideris nur la vizaĝon, sed ankaŭ la frunton*, mentonon*, bruston, ventron*, dorson, gluteojn* kaj maleolojn*. Viroj tamen faras nur vangajn* kaj mentonajn tatuojn. Nur inecaj viroj faras la aliajn, sed tio ne estas ofta.


Por tatui oni uzas kunligitajn pinglojn*. Per ili oni ekfrapetas la lokon, kiun oni deziras surdesegni. Oni faras diversajn

bildojn laŭdezire. Poste oni metas nigran kolorilon. Kiam resaniĝas la vundoj*, ili aspektas malhelaj. Ankaŭ uzeblas poŝtranĉileto; ĝin uzas virinoj por tatui al si la bruston, ventron kaj dorson. Kaj ankaŭ por la vizaĝo kaj maleoloj.

Nuntempe multaj el tiuj, kiuj portas haŭtmarkojn, bedaŭregas, ke pro tio oni mokas ilin; sed jen grava problemo: ne estas facile forigi tatuojn! □



estas de Èkiti kaj la dua de Ijèsà. La 3-a tatuoj nomiĝas *tùre*. La 4-a estas *pélé* de Ifè. La 5-a estas la miriga *keke* de Olówu. La 6-a estas *pélé* uzata en Ondó; ĝi konsistas el unu sola streko* maldika sed profunda. La 7-a kaj 8-a estas la bela *gòmbò* tia, kia oni ĝin kutimas en Oyo, Ibàdàn, Ogbómòšò, Iwó kaj aliaj.



Ŝŝhò-Davies Olúwábùnmí, studento pri sociologio. Lia verko *Subluna rakontaro de la joruba mondeto* kolektita de ĉ. 40 popoloj rakontoj en Esperanto, atendas eldoniston.



¹ Ĉiujn nomojn elparolu kiel en Esperanto. La literon *j* legu kiel ĝ, *w* kiel ŭ kaj *y* kiel *j*.

- gluteo**: sid-vangoj; postajo
- frunto**: plej alta parto de la vizaĝo
- islamano**: sekvanto de Mahometo
- kandidato**: homo, kiu pretiĝas por ofico, ekzameno aŭ simile
- korpo**: la tutaĵo de vivulo
- kristano**: kredanto je Jesuo Kristo
- maleolo**: ĉiu el la du ostaj elstarajoj ĉe la ekstera kaj interna flankoj inter la kruro kaj piedo
- mentono**: parto de la vizaĝo sub la lipoj
- ornamaĵo**: pli-belig-aĵo

- pinglo**: metala pikilo por fiksi ŝtofon
- raso**: granda hom-familio. Oni parolas pri tri ĉefaj rasoj: blanka, flava kaj nigra
- sklavo**: servisto sen rajtoj, kiun alia homo povas aĉeti
- sorĉi**: fari bonon aŭ malbonon per ia super-natura forto
- strio**: io mallarĝa, longa, simila al linio
- tatui**: fari sur ies haŭto ne-forig-eblajn desegnaĵojn,
- ventro**: antaŭa parto de la korpo sub la brusto
- vango**: ĉiu el la du rondaj flankaj partoj de la vizaĝo, sub la okulo, inter buŝo kaj oreloj
- vundo**: tranĉo aŭ frapo en la korpo

Ne movigu!

Claude Piron, Svislando

TIUTEMPE ni vivis en Madagaskaro. Mi estis naŭ-jara kaj Ivo, mia frato, du jarojn pli juna ol mi. Post somero en Svislando ĉe familianoj, ni ekflugis hejmen. Neniu hejmano aŭ amiko venis kun ni. Prizorgis nin iu stevardino*.

Je la dua horo nokte la aviadilo* alteriĝis en Ĝibution. Nia stevardino kuniris kun ni, en la flughaveno*, ĝis iu granda ejo kun multaj tabloj kaj seĝoj. Ŝi sidigis nin, duon-dormajn, ĉe tablo, alportis trinkaĵojn kaj diris: "Ne moviĝu de ĉi tie, ĝis mi revenos. Ne moviĝu!" Ŝi parolis tre forte, eble ĉar ŝi opiniis, ke, pro la dormemo, ni povus ne kompreni ŝin. Ŝi ripetis plurfoje tiujn samajn vortojn, antaŭ ol foriri.

La trinko baldaŭ estis for, sed ne la atendo. Ĉiu minuto daŭris longege. Ni ne sentis deziron interparoli aŭ ludi, kaj nenio speciala okazis tiuloke. Fine tamen la vortoj, kiujn ni tre esperis, sonis en la tuta flughaveno: "La vojaĝantoj al Antananarivo bonvolu tuj iri al elir-pordo numero 3."

"Ni baldaŭ reforflugos", mi diris al Ivo. Responde, li senvorte ridetis.

La stevardino ŝajne malfruis, sed

kion fari? Post plua iom longa atendado, en ĉiuj partoj de la flughaveno aŭdeblis nova forta-sona diraĵo, plej plezurige por ni: "Lasta alparolo por la vojaĝantoj al Antananarivo. La vojaĝantoj de flugo 177 rapide prezentu sin ĉe pordo numero 3". Krom ni, restis nur du personoj en la trinkejo. Ili ekstaris kaj iris for. Nia soleco igis la lokon ege granda, ni sentis nin tute etaj, neniaĵo en ĝi.

"Ĉu ni ne devus ekiri?" demandis la frateto, time.

Ankaŭ mi komencis timi, sed mi respondis: "La stevardino diris: ne moviĝu, mi revenos por vi. Verŝajne nur post la aliaj ni eniros la aviadilon."

Ĉi tiun ni vidis. Ĝi staris unu kilometron for. Tra la grandega fenestro la tuta deflugejo estis bone videbla. La ne-veno de la stevardino igis min pli kaj pli zorgo-plena. Ni ja vidis aŭtobuson alveni, la vojaĝantojn eniri en ĝin. Estis niaj kunuloj: plurajn ni rekonis. La aŭtobuso ekveturis. Ĝi malproksimiĝis direkte al la aviadilo. Kun ĝi foriris nia ridetemo.

"Nur ni restas ĉi tie, ni estas tute solaj", Ivo diris, post ĉirkaŭ-rigardo.

Tamen infano devas fari, kion plenkreskulo diris, ĉu ne? La stevardino parolis kiel ĉefo, certa pri sia estreco. "Ne moviĝu", estis ŝiaj vortoj, tute klaraj: ni eble povis moviĝi sur-loke, sed tute certe ne el-trinkej-iĝi.

Ni vidis la vojaĝantojn eliri el la aŭtobuso, sekvi unu la alian sur la movebla ŝtuparo, eniri la aviadilon. Ni rigardis per larĝegaj okuloj, demandoplenaj. La aviadilaj pordoj fermiĝis, la movebla ŝtuparo forlasis sian lokon, ekiris revene. La aviadilo komencis moviĝi antaŭen.

"Io estas neĝusta", Ivo diris plor*-ete. Mi sentis min malbone. Respondeca. Pli-aĝaj fratoj ĉiam sentas sin respondecaj. Gepatroj ne sufiĉe pensas, kiom malfacila, zorgiga, problem-dona estas tiu sento de respondeco por ni etuloj, tiel senfortaj. Ankaŭ mi deziris plori, sed mi malvolis montri min plorema al la frateto. Kion li opinius pri mi? Kaj mia plorado nur kreskigus lian timon.

Kaj jen mi ekpensis pri io grava: niaj pasporto*, niaj aferoj, ĉio nia restis en la aviadilo, trans tiu pordo, kiu jam fermiĝis. Kaptis min zorgego. Se ni devos tranokti ĉi tie, eĉ niajn

FORUMO

estas informa, interkonatiga bul-teno, kun Beletra Niĉo, aperanta ses fojojn jare.

estas fronto kontraŭ kaj lingva kaj seksa diskriminacio.

estas forumo de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj, aktuale legata de lesboj kaj gejoj en 40 landoj.

Por specimena ekzemplero kaj informoj pri LSG bv. sendi internacian respond-kuponon al Peter Danning, 68 Church Rd., RICHMOND, Sy, Britio, TW10 6LN.

aviadilo: plej ofta flugveturilo

flughaveno: haveno (restadejo, antaŭe nur por ŝipoj), en kiu oni en- kaj el-aviadil-iĝas

kontrolituro: turo (alta, mallarĝa konstruaĵo) de kie eblas kontroli (rigardi, ĉu io ĝuste iras)

okulo: tio, per kio ni vidas

pasporto: tio, kion oni montras al oficisto por povi eniri landon

plori: malridi; eligi akvon el la okuloj

sklavo: servisto sen rajtoj, kiun alia homo povas aĉeti

stevardino: virino, kiu servas trinkaĵojn kaj manĝaĵojn en flugveturilo

ŝtuparo: suprenirejo el aro da ŝtupoj (ŝtupo: sur ĝin oni metas piedon por iri supren/suben)

anonctabulo

TARIFO: 0,50 gld. por ĉiu vorto. Tri internaciaj respondkuponoj por dek vortoj.

Mi apartenas al la grupo Etularo, kiu bazas sian ideologion sur *La eta princo* de Antoine de Saint-Exupéry. Mi tre bezonas tiun libron en Esperanto. Ĉu iu povas sendi ĝin al mi?
Mahmud Mirbozorgi
No. 1294, Kh. Shariāti
Manteghe 5
Eslamabad, Karaj
Irano

20-jara fraŭlo, bibliotekisto kaj ĵurnalisto deziras korespondi tutmonde precipe pri nacia kaj internacia futbalo. Post la interŝanĝo de leteroj, pli detale!
Adreso: Zsolt ZAGONI
Nyár u. 11
HU-1043 Budapest
Hungario

25-jara oficisto deziras korespondi kaj interŝanĝi bildkartojn.
Masud Gudarzy
No. 38 Sh. Maleki Lane
Siavosh Str., Azadi Ave.
IR-Borujerd 69-188
Irano

Ni serĉas partnerojn, kunlaborantojn kaj subtenantojn el la tuta mondo por nia muzeo, kies kolekto ampleksas pli ol 15.000 diversajojn el 100 landoj pri la universalaĵaj homaj valoroj kaj globskalaj problemoj. Korespondado Esperante, angle, uzbeke kaj ruse. Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro, Pk. 76 UZ-703000 Samarkando Uzbekio

Profesorino, komencanto pri Esperanto, deziras korespondi.
Gloria Pentón Gómez
San Lázaro 612 (entre Gervasio y Escobar), 2-do piso
Centro Habana, La Habana
Kubo

Korespondemulojn diversajajn el la tuta mondo serĉas Esperanto-societo "Hristo Kozlev"
Pk. 61
BG-5180 Polski Trambes
Bulgario

karegajn ludilojn ni ne havos kun ni. Krome mi sciis, ke survoje al Antananarivo aviadiloj alteriĝas en Ĝibution nur dufoje semajne. Tri tagojn do ni devos resti sen mono, sen aliaj vestoj, sen io. Ĉe tiu penso mi eksentis min tute malvarma. Mi iĝis senviva, senkolora, sen povo pensi. Mi rigardis Ivon, kontenta, ke lia rigardo direktiĝas ne al mi, sed al la transfenestra nokto. Ne plaĉus, ke li rimarku mian malesperon.

Eniris la ejon flughavena oficisto. Kun granda miro li ekvidis nin.

"Kion vi faras ĉi tie?" li demandis.

"Ni atendas. La stevardino, kiu zorgas pri ni, diris: ne moviĝu, mi revenos por vi."

"Kien do vi devas iri?"

"Al Madagaskaro."

"Madagaskaro! Sed la aviadilo..."

Li rigardis tra-fenestre. Vidi lin sufiĉis. Ni ne bezonis vortojn por kompreni, kiel ĝusta estis nia timo.

"Ne moviĝu!" ankaŭ li diris, antaŭ ol malaperi. Kial ĝuste tiujn vortojn? Ili kunportis kun si nur ideojn de senelira situacio. Du kontraŭaj bezonoj tenis nin en preno. Por trovi enan pacon, ni devis moviĝi ĝis la aviadilo, kiu flugigos nin hejmen. Sed por

kontentigi la grandulojn ni devis ne moviĝi. Samtempe senti du bezonojn kontraŭajn unu al la alia elprenas de infano la etajn fortojn, kiujn li havas.

Plua atendado. Envenis min ideo ege malvarmiga: ĉu oni volas vendi nin? Mi sciis, ke Arabio ne malproksimas. Kaj mi foje aŭdis, ke tie, kaŝe plu ekzistas sklaveco*. Mia frato rigardis min. Li kompreneble ne povis vidi miajn pensojn, sed li certe sentis ilin, ĉar li rekomencis plori.

Mirinda estas la homa vidpovo. Ni rigardis unu la alian, do ne trans la fenestron. Kaj tamen ni samminute sentis, ke io tie transe okazas. Samtempe ni turnis la rigardon al la deflugejo. Mirindaĵo! Ni vidis la aviadilon ek-iĝi senmova. Nova espero replenigis nin. Sed kiam, post ne tro longe, revenis la oficisto, mi ektimis refoje. Ĉu li rediros: "Ne moviĝu"? Feliĉe ne. Li eligis nur la tri vortojn, kiujn mi plej esperis aŭdi: "Venu kun mi". Finfine ni rajtis moviĝi! Kiam ni eliris el la konstruaĵo, frapis nin varmeĝo. Ĝibutiaj noktoj povas esti ege varmaj. Sed eĉ tiu varmo estis plaĉa: ĝi signifis alhejmiĝon. Tuj aŭto alvenis kaj rapide transportis nin ĝis la aviadilo.

"Kial la stevardino ne venis por ni?" mi demandis la oficiston.

"Tiu senpensulino simple forgesis vin", li diris. "Feliĉe, ke mi trairis la trinkejon. Mi tuj telefonis al la kontrol-turo*. La amiko, kiu de tie donas al la flugmaŝinoj permeson forflugi, per radio klarigis pri vi al la uloj en la aviadilo."

Mia frato ridetis, ridis, ridegis.

"Rigardu", li diris, "jen venas movebla ŝtuparo. Nur por ni". Grava li sentis sin, sed mi min nur malplena. Malplena je fortoj, je pensoj, je vivo. Kiam ni eniris la aviadilon, la vojaĝantoj ĵetis al ni rigardojn plenajn je malamikeco. Mi sub-aŭdis iliajn pensojn. "Tiu du knabaĉoj certe iris perdiĝi ie, kien ili ne rajtis iri. Pro ilia ludemo ni malfruas." Mi sentis emon frapi tiujn mispensantojn. Sed kion povas fari knabo kontraŭ tuta aro da fortuloj? Mi eksidis mia-loke kaj fermis la okulojn. "Moviĝu, moviĝu, moviĝu" mi diris al la aviadilo. Se kredi Ivon, mi ripetis tiujn vortojn, eĉ kiam mi dormis, dum longa tempo. Verŝajne mi tiel provis resanigi min el malsaniga sperto: devi iri ien kaj ne rajti moviĝi. □

Ami kinon:

Laodoro de la papajo verda

Originala titolo: *Mui du du xanh* (Vjetnamio-Francio, 1993) (01h40)

Reĝisoro: Tran Anh Hung
Ĉefrolulo: Yen Khe

“F ilmo pri Vjetnamio? Ĝi certe sangoplene temos pri la milito usona-vjetnama”, mi pensis je la unua rigardo, kaj tiajn filmojn, sincere dirite, mi ne tro multe ŝatas. Mi trafis tre malĝuste: Ĉi tiu filmo – premiita en la pasintjara Filmfestivalo de Cannes (Francio) per la Ora Kamerao, tuj post kio mi vidis ĝin en Francio – plenas je paco, harmonio kaj tre originalaj, belaj bildoj, kaj ĝi tiom plaĉis al mi, ke malgraŭ ĝia ekzotikeco (certe ne en ĉiu kinejo de via lando ĝi estos montrata) mi volus rekomendi ĝin al vi.

Temas pri la historio de Mui', dekjara tre ĉarma, sed malriĉa knabino, kiu en 1951 dungiĝas ĉe tre bonhava familio en Sajgono: tie tre delikate ŝi enamiĝas al amiko de la plej aĝa filo de la familio. Dek jarojn poste, dudekjara do, ni retrovas ŝin dungita

ĉe tiu amiko, kiu intertempe estas sukcesa komponisto. Tre tenere iom post iom ŝi por li evoluas de servantino al juna fianĉino.

La okulojn de la spektantoj pasas konfliktoj, etaj interpersonaj



dramoj, intimaj ĝojoj grandaj kaj malgrandaj. Sed kio kortuŝas estas ne nepre la historio mem, sed la ravaj bildoj pri sunplenaj kortoj malfermaj, plenaj de floroj kaj legomoj, nekredible belaj homoj, kiuj serene ridante moviĝas junece senĝene kaj samtempe tre elegante, pacoplenaj scenoj de amodonaj interrilatoj kaj de estetika belo en ŝajne tre ĉiutagaj aĵoj: vazoj, mebloj, formikoj kaj lumreflektoj sur la sablo de la korto...

Ĉio tio tre azias. Patro kaj plej aĝa filo de la familio laŭ la vjetnama tradicio muzikemas kaj per tio

vivigas la kontemplan trankvilon. La preparo de manĝaĵoj samkiel ĉiuj aliaj ĉiutagaj aĵoj kvazaŭ palpeble proksimas... Tamen, la filmo neniel ecas je kiĉo aŭ je tro ŝablona ekzotikismo, sed estas laboro de impresionista majstro, laboro kiu eble pli proksimas al verko de skulptisto ol de kinisto.

Sendube ĉio ĉi aparte taŭgas por revemaj eŭropanoj inter la spektantoj, kiuj aziemas kaj aparte ĝuas tiel belajn bildojn...

Antaŭ jaroj mi iam aŭdis la onidiron, ke inter vjetnamoj, aŭ

ĝenerale inter sudorientaj azianoj aparte oftas escepte belaj homoj – nu, antaŭjuĝoj ĝenerale estas malfidindaj; sed post tiu ĉi filmo mi facile povus kredi tiun ĉi onidiron.

Unuafoje mi vidis la filmon en la vjetnama kun francaj subtitoloj – tial ankaŭ la lingvaĵo tre plaĉe originalis: Jen filmo subtala kaj tenera, kontraste al la kutimaj hektikaj scenoj de aŭtoĉasado, brutalaj pugnobatadoj aŭ mitralaj amasmurdoj. Se vi havas ŝancon vidi *Laodoro de la papajo verda* (cetere, la partoprenantoj de la TEJO/KER-seminario en Strasburgo pasintmaje havis tiun eblecon kaj tre ĝuis la originalan version kun viva sinkronigo de dialogoj en Esperanto), uzu la okazon por vidi ĝin – indas!

Thomas Pusch, Germanio

REZULTOJ

Jen la solvo de la krucvorto publikigita en *KONTAKTO* 139, 1994:1. Lotume gajnis Jorge Llambías el Usono, kiun ni varme gratulas!

	1	2	3	4	5	6	7	8	9
1	G	R	A	N	D	I	O	Z	E
2	A	E	R	P	U	M	P	I	L
3	Z	E	O	S	P	I	N	I	
4	E	K	A	L	U	G	R		
5	T	E	S	U	O	M	I		
6	I	N	F	U	N	D	I	B	L
7	S	P	O	N	G	A	R	A	
8	T	O	C	N	A	O	S		
9	A	T	E	I	S	T	O	I	
10	R	I	N	O	C	E	R	O	
11	A	G	O	N	I	T	N	T	
12	N	I	O	O	M	O	T	O	

KONTAKTO

JARKOLEKTO '93

Se vi ne ricevis nian revuon pasintjare, nun vi havas la eblon aĉeti unuopajn numerojn! Numeroj 1, 2, 3 kaj 4 kostas po 4 gld. kaj la duobla numero 5-6 kostas 6 gld.

Se vi mendas la tutan kolekton, vi pagas nur 18 gld. Se vi mendas minimume 3 kompletojn, vi ricevos rabaton de 1/3 kaj sekve la unuopa prezo estos nur 12 gld.! (Atentu kluboj kaj kurs-vidantoj.)

La prezoj inkluzivas sendokostojn. Por la landoj de la Eŭropa Unio aldoniĝas 6% por imposto. Mendu ĉe UEA!





Viaj reagoj kaj sugestoj estas bonvenaj ĉe nia adreso.
La redakcio ne respondecas pri la opinioj de la legantoj.

Diabla cirklo

Kelkaj tezoj el "La diabla cirklo" (KONTAKTO 137/138, 1993:5/6), kiujn la recenzo prezentas, ŝajnas al mi tre strangaj. Oni devas kompreni ilin tiel, ke la celo gajni subtenon por Esperanto ĉiukaze superu la privatan uzon kaj eĉ la scipovon de la lingvo. Eĉ se iu havas tiajn preferojn, oni povas sukcese varbi nur por lingvo vivanta. Do mi maligis du frazojn: Ju pli (kaj ju pli efike) oni laboras interne (al tio apartenas ankaŭ la aperigo de KONTAKTO), des pli oni havas la ŝancon esti aŭskultata. Kaj la fortostreĉo por Esperanto-lernado estas nepre bazo por altiri neesperantistojn.

Reinhard Pflüger, Germanio

Efiko

Hodiaŭ mi restis seninforma pri la mondaj okazaĵoj, ĉar la ordinarajn gazetojn mi ne tuŝis. Jes, KONTAKTO alvenis!

Diana Izquierdo, Usono

Alvoko por vivo

Saluton. Mia nomo estas Aleksej. Mi estas 16-jara kaj loĝas ĉe la norda poluso, en Murmansko, Rusio. Mi estas en la 10-a klaso de la gimnazio, sed pro mia sanstato mi studas hejme. Pasintjare mi trapasis ĉiujn studfakojn per "tre bone". Al mi aparte plaĉas matematiko. Mi ŝakludas kun geknaboj el murmanska ŝako-klubo telefone. Ankaŭ futbalon kaj hokeon mi ŝategas, sed devas kontentiĝi per televidilo.

Ĝis mia 4-a vivojaro mi kreskis kaj evoluis normale, sed tiam oni diagnozis ĉe mi progresintan muskolan distrofion de Duchenne. 7-jara mi ekvizitis lernejon, sidis kun la aliaj geknaboj kaj povis kuri kun ili. Sed jam tiam pli kaj pli graviĝis la muskola malforteco ĉe la gamboj. Fariĝis malfacile movi ilin kaj je la aĝo de 8 mi tute ĉesis marŝi. Iom poste mi malfacile levis la brakojn, kaj fine tute ĉesis levi ilin. Aperis kontrakturoj ĉe la gamboj kaj brakoj.

La promeso

Elitaligis Cláudio Rodrigues Pistilli, Brazilo

tre
facila

Ĝiĝjo Riĉi estis forte malsana, tial li venigis la pastron*, al kiu li diris: "Sinjora pastro, mi petas, ke vi preĝu* por mia sano. Se mi resaniĝos, mi donos kvindek lirojn* por la konstruado de la nova preĝejo*".

La pastro preĝis, Ĝiĝjo Riĉi resaniĝis, tamen li ŝajne tute forgesis la promeson*, kiun li faris al la pastro. Plurfoje la pastro provis memori al li la promeson, sed li ne sukcesis. Tiam la pastro diris: "Vi promesis doni kvindek lirojn por la konstruado de la nova preĝejo, Ĝiĝjo". "Ĉu...? Ĉu mi diris tion?", forte mirigita. "Bone, tio nur grave malsana mi demandis li tre montras, kiel estis!" □



liroitala mon-unuo preĝiparoli al Dio por peti aŭ danki
pastrohomio, kiu gvidas servon pri promescertigi, ke oni faros aŭ donos

La vivo de d-ro LL. Zamenhof en bildoj



128-paĝa, grandformata (A4), bildlibro per kiu Henk Thien (fondinto de la Foto-Servo pri Zamenhof) kondukas vin tra la vivo de la iniciatinto de Esperanto. 114 nigrablankaj fotoj kaj 25 mapoj, ĉio kronologie aranĝita kaj prikomentita. La libro celas esti utila dokumento el kiu oni facile povas represi la materialon aŭ utiligi ĝin alimaniere.

Prezo: 30,00 (por Europa Unio 31,80) guldenoj, plus sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, kiu estas la sola distribuanto kaj donas trionan rabaton por ĉiu samtempa mendo de minimume tri ekzempleroj.

Nek masaĝado nek gimnastiko nek kuraciloj donis pozitivajn rezultojn.

Mia tuta vivo konsistas el legado de ĵurnaloj kaj libroj. Min tudas tia vivo! Dum tiuj ĉi 12 jaroj miaj gepatroj veturigis min ĉien celante kuracadon: Pjatigorsko, Jevpatorjo, Ĵitomiro, Voroneĵo, Leningrado, Moskvo. Sed mi ricevis nur gimnastikon, injektojn de ATF enmuskole, vitaminojn de grupo B... Ĉu vere ne ekzistas aliaj rimedoj?! Dum la lastaj 2 jaroj eĉ ne unu kuracisto informiĝis pri mia sano! Mi do ekkomprenis, ke mi estas necesa por neniu, krom miaj gepatroj.

La malsano progresas. Mi ne povas mem servi min, do mi plene dependas de tiuj, kiuj estas apude. Mi ne eltenas plu! Sidi kaj atendi nenion ne kongruas kun mia karaktero. Mi jam leteris ĉien, sed venis nur respondaĉo: "En la tuta mondo ne ekzistas kuraco por tiu malsano." La situacio ŝajnis senelira.

Panjo, fininte kurson pri Esperanto, komencis korespondi kun esperantistoj el multaj landoj. En 1991 ŝi veturis al la 8-a Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en Litovio, kie ŝi konatiĝis kun ĉina kuracisto-akupunkturisto. Li

efektivigis semajnan traktadon, sed ree estis nenia plibonigo.

Mi perdis preskaŭ komplete miajn esperojn, sed jen mi legis en ĵurnalo POLUSA VERO de la 6-a de februaro 1993, ke "progresintan muskolan distrofion de Duchenne oni komencis kuraci en Usono, ĉe la Stanforda Universitato"! Nun ekflamis fajreto de espero en mia animo! Sed, por efektiviĝi mian resaniĝon, necesas miloj da dolaroj! De kie preni tiun sumon?! Mia kuracado tie estas tamen mia lasta espero!

Karaj bonaj homoj de la mondo, mi apelacias al via korfavoro! Bonvolu helpi min! Ne lasu min morti! Helpu kolekti monon por mia kuracado en Stanfordo! Mi petegas, ebligu mian resaniĝon!

Red.: Jam ekzistas ŝparkonto en rusa banko por kuracado de invalido de 1-a grupo Nikulin Aleksej Aleksejeviĉ. Faru vian kontribuon al konto 0730000028, Murmanska Banko N 06500041, Lenina Fako, Konto 6500114001 je la nomo de Nikulina Nina Aleksejevna. Republikigo de tiu ĉi letero estas petata. Adreso de Aleksej: Pricokzalnaja 20-8, RU-183038 Murmansko, Rusio.

La famaj verkistinoj Zama Hoff, Vara Gen kaj Ivola Pena, kaj iliaj viraj kolegoj Bo Gi kaj K. Loĉai estis gajnintoj de la Bellertaj Konkursoj dum kvin sinsekvaj jaroj, ĉiuj tamen en malsamaj branĉoj.


Per la helpo de la apudaj helpindikoj malkovru, kiu gajnis kiun branĉon en kiu jaro, kaj kiu estis la titolo de la koncerna verko. Sendu vian rezulton al nia redakcio antaŭ la 24-a de septembro 1994. Inter la solvintoj ni lotumos ekzempleron de la fama libro *La bona lingvo* de Claude Piron.

Bellertaj Konkursoj


Anna Lowenstein, Italio

Helpindikoj

1. La bone konata korea verkisto Bo Gi gajnis en 1991.
2. Vara Gen gajnis en la branĉo "Teatraĵo", sed nek ŝi nek ŝia bona amikino Zama Hoff verkis *Tedu min sinjoro*, kiu estis premiita en 1993.
3. Ivola Pena famiĝis pro sia sprita verkaĵo *La nepoj vin ĝenos*, kiu ne estis poemo.
4. La epopea poemo, kiu gajnis en 1989, ne nomiĝis *La plenkreska graso*.
5. La verkinto de la premiita infanlibro, kiu ne estis K. Loĉai, ne gajnis en 1990.
6. Malgraŭ sia streĉa laboro en ŝtata oficejo, unu el la gajnintoj sukcesis produkti sian profundan kaj pensigan eseon *Ho, mia pied'*, verkante nur dum siaj kafopaŭzoj.



	Zama Hoff	Vara Gen	Ivola Pena	Bo Gi	K. Loĉai	Prozo	Poezio	Teatraĵo	Infanlibro	Eseo	<i>Ho, mia pied'</i>	<i>La nepoj vin ĝenos</i>	<i>Tedu min sinjoro</i>	<i>Drivu la flava vel'</i>	<i>La plenkreska graso</i>
1989				X											
1990				X											
1991	X	X	X	✓	X										
1992				X											
1993				X											
<i>Ho, mia pied'</i>															
<i>La nepoj vin ĝenos</i>															
<i>Tedu min sinjoro</i>															
<i>Drivu la flava vel'</i>															
<i>La plenkreska graso</i>															
Prozo															
Poezio															
Teatraĵo															
Infanlibro															
Eseo															



Noto: Kvankam la helpindikoj ŝajnas malmultaj, ili provizas ĉiujn necesajn informojn per kiuj vi povos atingi la solan eblan ĝustan solvon. Faru jene: tralegu la helpindikojn kaj enskribu en la tabelon ĉiujn tuje certajn informojn, uzante "X" por definitiva "ne", kaj "✓" por definitiva "jes". La unua helpindiko estas jam notita en la tabelo por montri, kiel fari. Fininte tion, vi eble imagos, ke ne eblas antaŭeniri. Sed ne senesperigu: relegu kaj komparu la helpindikojn tre atente, kaj vi konstatos, ke ekzistas malpli evidentaj kaŝitaj informoj. Ekzemple, se Bo Gi gajnis en 1991, evidente li ne povis respondeci pri la verko, kiu aperis en alia jaro. Ne necesas diveni aŭ fari senbazajn antaŭsupozojn: la problemon vi povos solvi uzante puran logikon, konstruante ĉiun paŝon sur la antaŭaj.

dato	verkisto	branĉo	titolo

SOLVO